# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado


**Enhavo**


- AMO 66 – valoraj forumoj
- VEKI-programo alkroĉe
- Esperanto-Tago post dek tagoj
- Afiŝoj pretigitaj en 26 lingvoj



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.



*EKO 2020-38 sendita el Budapeŝto, la 16an de julio*


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Vekiĝu: partoprenu en la 66a AMO-seminario




La pionira Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI (VEKI) okazos tra la lasta semajno de julio. Ĝia lasta tago (vendrede 31-an de julio) gastigos la 66an Seminarion por Aktivula Maturigo (AMO), kaj krome festos la fermon de la 7-taga VEKI.

Laŭ aŭdaca plano, AMO okazos laŭ du tempoblokoj. Unua sesio okazas ekde 05:00 laŭ CEST (UTC+2) sub la nomo: 'Kalifornia sunsubiro'. Tiu sesio servos la Amerikan kontinenton. Programeroj por tiu bloko estos troveblaj en la retejo de ILEI. Dua sesio okazos je la 15-a horo CEST (UTC+2), kun la titolo 'Ĉefplado: Instruistoj kiel aktivuloj' – tiu sesio konvenas por Afriko, Eŭropo kaj (per prokrastado de la enlitiĝo!) Azio. La temo de AMO 66: 'Instruistoj - iliaj roloj, taskoj kaj respondecoj'. Ekde 15 :00 CEST: Podia diskuto kun Katalin Kovats, Stano Marcek, Monika Molnar, Mireille Grosjean. Temo: instruistoj gvidas lernadon (Mirejo ne skribis : transdonas sciojn….): iliaj taskoj, respondecoj, devoj, motivadoj.

Ekde 17:00 CEST: Podia diskuto kun François Hounsounou, Mireille Grosjean, Elena Nadikova, José Antonio Vergara. Temo : instruistoj estas homoj kun infanoj kaj junuloj. Ĉu pli da viroj, pli da virinoj en tiu profesio? Ĉu tuŝi aŭ ne tuŝi? Ĉu puni aŭ ne puni Ĉu bati aŭ ne bati ? Perdo de prestiĝo - malfacila profesio. Junulinoj tentas instruistojn.

Resume, provokaj kaj aktualaj demandoj – por edukistoj, gepatroj kaj ĉiu ajn! La teknika realigo de la programo okazos pere de kunlaboro inter ILEI kaj E@I.

Jen la ligilo por atingi la plej aktualan formon de la programo.

[Programskizo de VEKI (15-an de julio 2020)]

Ni aldonas la plej aktualan formon de la programo, kiu donas amason da informoj pri la riĉa programo.

Por aliĝi al VEKI, la Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI 2020, iru al https://veki.ilei.info/

(Atentu: la 19-a de julio estas la lasta tago por aliĝi senpage al VEKI!)

## Afiŝoj por la Esperanto-Tago (la 26an de julio)

Siatempa Estrarano de UEA, Stefano Keller, kune kun brita artisto Peter Oliver ripetas sian plurjaran kunlaboron por proponi belan, elŝuteblan afiŝon en 26 lingvo-variaĵoj. Trovu ilin ĉe http://www.linguistic-rights.org/esperanto-tago/2020/

- **angla** | en | English
- ***bengala* | *bn* | *বাংলা ভাষা***
- ***bulgara*** | *bg* | *Български*
- ***ĉina* | *zh* | *中文***
- ***dana* | *da* | *Dansk***
- ***esperanta* | *eo* | *Esperanto***
- ***farsia* | *fa* | فارسی - *Parsi/Farsi***
- ***franca* | *fr* | *Français***
- ***greka*** | *el* | *ελληνικά*
- ***guĝarata* | *gu* | *ગુજરાતી***
- ***hindia* | *hi* | हिन्दी**
- ***hispana* | *es* | *Español***
- ***hungara* | *hu* | *magyar***
- ***indonezia*** | *id* | *Bahasa Indonesia*
- ***itala* | *it* | *Italiano***
- ***korea* | *ko* | *한국어, 조선말***
- ***panĝaba* | *pa* | *ਪੰਜਾਬੀ (gurumuĥa)***
- ***rusa*** | *ru* | *русский*
- ***serba*** | *sr* | *српски*
- ***serba*** | *sr* | *Srpski*
- ***slovena*** | *sl* | *Slovenščina*
- *tajvana* | *zh/tw* | *繁體中文*
- ***telugua* | *te* | *తెలుగు***
- ***turka*** | *tr* | *Türkçe*
- ***ukraina*** | *uk* | *українська мова*
- ***urdua* | *ur* | اردو**







Jen la Esperanta versio de la afiŝo, plus versio en unu nacia lingvo, elektite tute hazarde kaj senpartie – la hungara.

======= Vortoj: 510 ======

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.